



La Preĝejo de Sankta Albano, Kopenhago

La preĝejo de Sankta Albano, la sola anglikana-episkopa preĝejo en Danio, konsekriĝis en la jaro 1887. Antaŭ ĝia kompletigo angloparolantaj kristanoj kunvenis por diservi en diversaj luitaj salonegoj en Kopenhago kaj Elsinoro (Helsingør). La preĝejo de Sankta Albano estas parto de la tutmonda anglikana kongregacio, kiun gvidas la ĉefepiskopo de Canterbury, Anglio, kaj ĝi apartenas al la docezo de Eŭropo. Oni uzas la liturgion de la anglikana preĝejo (Church of England).

Konstruado de la preĝejo

Pli ol ĉirkaŭ 30 jaroj da diligenta laboro, monkoklektado kaj persisto estis rekompenciita per konstruo de la preĝejo de Sankta Albano de 1885 ĝis 1887. La situo de la preĝejo, proksime al la reĝa palaco, estis rezulto de helpo de Princino Alexandra (1844-1925), filino de la reĝo Christian IX de Danio (1818-1906) kaj ŝia edzo Edward, la Princo de Kimrio, poste la Reĝo Edward VII de Britio. La Princo Edward interesiĝis entuziasme pri la projekto kaj prezidis ĉe la londona monkoklektada komitato.

La unuan ŝtonon metis la Princino de Kimrio la 19-an de septembro 1885. Ĉeestis la Princo de Kimrio, la Reĝo Christian IX kaj la Reĝino Louise, la Caro kaj Carino de Rusio (la fratino de Alexandra) kaj anoj de la greka kaj aliaj skandinavaj reĝaj familioj. Tiuj revenis du jarojn poste por ĉeesti la konsekrado de la preĝejo la 17-an de septembro 1887.

La ekstera parto de la preĝejo

La preĝejo de Sankta Albano estas belega ekzemplo de viktoria gotika arkitekturo de la fruangla stilo. Ĝin desegnis la viktoria preĝeja arkitekto Kavaliro Arthur Blomfield, kaj ĝi plenumiĝis sub la kontrolo de la dana arkitekto Profesoro L. Fenger. Malgraŭ la tre angla aspekto de la preĝejo la plejparto de la konstrumaterialoj estas dana. La modluroj estas el kalkŝtono de Faxe kaj la eksteraj muroj estas tegitaj per klivita siliko de Stevns; ambaŭ lokoj situas en la suda parto de Zelando. La turpinto estas farita de tajlita ŝtono de Ölando en Svedio. La tegmento estas kovrita per tegoloj el Brosely en Shropshire, Anglio. Pro la karaktero de la terfundo la preĝejo konstruiĝis sur palisoj, kaj fakte la planko de la kripto estas sub la loka akvonivelo. Ĝi sekigaĝas per aŭtomata pumpilo.

La intera parto de la preĝejo

Ekde 1887, krom aldono de la monumentoj kaj memorigaj fenestroj, la preĝejo restas preskaŭ neŝanĝita. Tamen okazis kelkaj plibonigoj, ekzemple la instalo de elektra lumo kaj centra hejtado en la fruaj 1930-aj jaroj. La internaj surfacoj de la muroj kaj la modluroj estas de belaj blankaj kalkŝtonoj el Faxe. La kaheloj de la planko estis donaco de Campbell Tile Company el Staffordshire, Anglio. La baptujo (starigita apud la pordo por bonvenigi membrojn en la preĝejon pere de bapto), la predikejo kaj la altartabulo estas faritaj el terakoto kaj ceramikaĵoj de Doulton, kaj estas donacoj de la firmao Doulton & Co el Londono, Anglio.

La orgeno estis farita de J. W. Walker & Son, Londono, en la jaro 1887 kaj daŭre estas en sia origina kovraĵo. Harrison & Harrison en Durham, Anglio, restaŭrigis ĝin en 2004/5 kaj la amplekso etendigis por inkluzivi 1480 tubojn. La sonoriloj en la turo estas la originaj ok cilindraj sonoriloj de Harrington, instaligitaj en 1887. La turo ne estis planita por pli grandaj sonoriloj. En la jaro 2013 pligrandiĝis la nombro da sonoriloj kun sep, ankaŭ la novaj sonoriloj faritaj de Harrington je ĉirkaŭ la sama dato kiel la aliaj. La sonoriloj sonoras antaŭ kaj post diservoj. Ili sonoras la kvaronojn kaj ludas diversajn himnojn ĉiuhore.

La kolorigitaj vitroj originas de tri diversaj periodoj. La vitroj en la ĉefa parto de la preĝejo estas viktoriaj kaj estis faritaj de Heaton, Butler & Bayne en Londono inter la jaroj 1887 kaj 1901. La vitroj en la flanknavo estas partoj de la monumento memore al Princino Alexandra, farita de Geoffrey Webb fine de la 1920-jaroj, kaj la vitro en la flankkapelo, vitro dediĉita al la Princino Viggo, estis farita en 1971 de loka entrepreno. La viktoriaj vitroj estis purigitaj kaj tute replumbitaj dum granda projekto de konservado en 2011/12.

Sankta Albano

La preĝejo havas nomon laŭ Sankta Albano, la unua angla martiro (ĉirkaŭ 303 p.K.). Albano estis romana soldato, kiu protektis sacerdoton kontraŭ persekutado. Albano iĝis tiel inspirita per la kredo de la sacerdote ke, kiam la soldatoj alvenis serĉi lin, Albano mem prenis la vestojn de la sacerdote kaj transdonis sin mem. Provokita kaj kondamnita al la morto li proklamis: "Mi kultas kaj adoras la veran kaj vivan Dion, kiu kreis ĉion". La sacerdote ankaŭ li transdonis sin mem, inspirita per la kredo kaj kuraĝo de Albano. Laŭ la legendo la restaĵoj de Albano estis transportitaj al la preĝejo de Sankta Maria kaj Sankta Albano en Odense, Danio, kie la nomo de Sankta Albano oni ankoraŭ respektas.

Pli pri la historio de la preĝejo troviĝas en la anglalingva libreto: "*St Alban's History and Guide*" havebla en la enirejo de la preĝejo.

Hodiaŭ

Ni estas internacia kaj ĉioampleksa preĝeja familio kiu, adorante Dion ene de la anglikana-episkopa tradicio, bonvenigas homojn de ĉiuj kristanaj tradicioj kaj ankaŭ ilin, kiuj serĉas sian kredon en Dio. Momente ni havas homojn el 22 diversaj landoj en nia preĝeja komunumo, kaj dum la somero venas multaj vizitantoj al nia preĝejo kaj al niaj diservoj. Ankaŭ ekzistas preĝeja komunumo en Aarhus, kiu renkontiĝas ok fojojn jare en la preĝejo de Møllevang.

Se vi havas tempon eblas ekbruligi kandelon kaj diri preĝon aŭ lasi peton por preĝo en la libro por ĉi tia celo trovebla en la flanko kapelo de la preĝejo.

***La preĝejo ricevas nenian financan subtenon nek de Britio nek de Danio. Pro tio ni tre dankeme akceptas kontribuojn.
Estas telero kaj ankaŭ kolektujo en la muro por donacoj kiam vi forlasas la preĝejon je la oksidenta elirejo.***

**Ni dankas vin pro via vizito al la preĝejo de Sankta Albano.
Ni deziras al vi ĉion benon kaj esperas revidi vin baldaŭ.**